1-a Jaro, N.ro 17 — APERAS SEMAJNE — 22. Januaro 1925

ESPERANTO je la servo S.A.T. de la tutmonda PROLETARO

# SENNACIULO

☆ Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda ☆

La abonprezaro kaj reklamtarifo troviĝas sur la lasta paĝo — Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas. — Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia organo, kaj se oni sendas al la Red. du ekz. de la gazeto enhavanta la koncernan represaĵon. — Ponumera prezo: 0,05 dol.

| Redaktoro: N. BARTHELMESS<br>Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: E. LANTY<br>24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI. | Administranto: R. LERCHNER<br>Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz |
|---|---|---|

## Roza Luksemburg kaj V. I. Lenin kiel teoriuloj de laborista movado

Ke Lenin kaj Roza Luksemburg, same kiel Karl Libkneĥt, estis per ĉiuj fibroj de sia esteco homoj de ago, plenaj je batalemo, tio estas fakto al ĉiuj konata. Ankaŭ ilia morto tion atestas: Karl Libkneĥt kaj Roza Luksemburg falis sub la frapoj kaj pafoj de kontraŭ-revolucia murdistaro; Lenin mortis pro troa senfortiĝo post nelacigebla laborado je la servo de la proletaria revolucio.

Ĉiuj SAT-anoj devus memorsoleni la datrevenon de ilia morto, ĉar, kia ajn estas la politika diferenco inter tiuj mortintoj kaj aliaj tendencoj de la laborista movado: ni ne forgesu, ke en momento, kiam la tuta mondo per flagraj militflamoj ekbrulis kaj kiam tiom da internaciistoj subite ekfariĝis furiozaj ŝovinistoj, ili preskaŭ solaj, starante kontraŭ klasan malamikon senkompatan, heroe kaj senhezite komencis la batalon por la rekunligo internacia de la proletariaro, de profundaj tranĉeoj ekdisigita. SAT-ano, revolucia, sennacia proletario, kia ajn estas lia politika partio en la kontraŭburĝa batalo, ne povas rifuzi memorhonori homojn, kiuj depost la unua komenco de la milito imperialista ekorganizis batalegon kontraŭ la kapitalista buĉado.

Roza Luksemburg kaj Lenin estas la plej grandaj teoriuloj de la laborista movado depost la morto de Karl Marks kaj de Frederik Engels. Ĉiuj aliaj posteuloj de la du kreintoj de l'*socialismo scienca* estis pli-malpli bonaj popularigistoj de la marksista teorio, sed ili ne kreis ion novan; ili klarigis, kelkfoje eĉ pliperfektigis la admirindan konstruaĵon, kiun Marks kaj Engels al ni estis postlasintaj. Nur Lenin kaj Roza Luksemburg alkonstruis novajn flankaĵojn al la Marksa teoriaro; nur ili daŭrigis la verkon de la grandaj majstroj, aplikante la marksan teorion sur la epokon de kapitalismo apogeanta je imperialismo.

Marks kaj Engels al ni donis plej konkretan kaj precizan analizon de kapitalistaj produktadordo kaj socio. Ili vaste klarigis la devenon de la kapitalista profito, la kondiĉojn kaj leĝojn, kiuj regas la kapitalistan produktadon kaj reproduktadon, la sekreton de la ekspluatado de la salajruloj, kaj el tio ili tiris nombron da konkludoj por la taktiko kaj politiko de la proletariaro en la klasbatalo.

Sed depost la morto de Marks (1883) kaj de Engels (1896), la trajtoj de l'kapitalismo pli kaj pli ŝanĝiĝis. Alvenis la epoko de l'imperialismo, kiun nek Marks nek Engels estis konintaj. Anstataŭ la "malpeza" industrio — produktado de teksaĵoj kaj ĝenerale de konsumajoj ĉiuspecaj — la "peza" industrio, t. e. la fabrikado de produktiloj, de maŝinoj pli kaj pli grandegaj, la elfosado de karbo kaj de aliaj minaĵoj, la uzado pli kaj pli ĝenerala de nafto kaj de petrolo en la industrio, fariĝis la branĉo ĉefa kaj senkonteste direktanta de la kapitalista ekonomio. La organizaĵoj de la kapitalistoj: trustoj, karteloj, koncernoj, unuvorte la monopolismo komencis superregi en gigantaj dimensioj la tutan produktad- kaj distribusistemon. Samtempe la tendenco de la kapitalismo al pliampleksiĝo ekkoliziis kontraŭ nevenkeblan baron: la tero jam estis dispartigita inter la diversaj grandaj potencoj kapitalistaj; novaj kolonioj ne estis plu akireblaj; por havigi al si novajn teritoriojn por ekspluatado, por malfermo de merkatoj kaj por lokigi kapitalojn, ne estis plu eble okupi sendefendan, ĝis nun ne ekposeditan regionon, sed fariĝis necese, ĝin konkiri, per milito kontraŭ aliaj kapitalistaj ŝtatoj ĝin posedantaj aŭ dezirantaj. Kaj la ekspluatado de la kolonioj donis al la imperialista burĝaro la eblon, eltiri grandegajn kromprofitojn el la kolonioj kaj evoluigi ankoraŭ pli rapide la grandindustrian produktadon.

Vidante tian evolucion, multe da socialistoj komencis dubi pri la praveco de la Marksa teorio. Marks kaj Engels estis antaŭvidintaj renversiĝon de la kapitalista socio, revoluciemiĝon grandiĝantan de la laboristaro, pliakriĝon de la klasbatalo: anstataŭ ĉio tio, oni konstatis je la komenco de la XXa jarcento plifortiĝon de la kapitalismo, gigantan evolucion de la produkciaj fortoj, alkutimiĝon pli kaj pli senteblan de grandaj partoj de la proletariaro al la vivo en la sino de l'kapitalismo, plimildiĝon de la klasaj kontraŭecoj. Ĉu tio ne pruvis, ke Marks kaj Engels eraris, ke proletaria revolucio estis utopiaĵo, ke klasbatalo estis iluzio?

Tiam nur malmulte da socialistoj restis fidelaj al la revolucia marksismo. En la Internacio socialista, Lenin kaj Roza Luksemburg defendis la pravecon de la Marksa vidpunkto malgraŭ ĉiaj ŝajnaj pruvoj. Ili rigardis *ne nur la trompan eksteraĵon de la faktoj, sed la faktojn mem.*

Roza Luksemburg plenumis la plej gigantan teorian verkon depost la morto de Frederik Engels. Ŝi elmontris en sia eterne fama "Akumulado de la Kapitalo", ke malgraŭ ĉio, la kapitalismo estis alvenanta al sia historia baro, al la sojlo de sia morto; ke la imperialista epoko al la burĝa socio havigas nedaŭran prosperon; ke tiu prospero malaperos per la manko de liberaj regionoj nekapitalistaj sur la terglobo; ke la batalado por la akiro de la restaĵoj de nekapitalistaj merkatoj puŝas la kapitalistan socion neeviteble al imperialistaj militoj; ke tiuj militoj pliakrigos la

klasajn kontraŭecojn, plifortigos la klasbatalon, ĵetegos la proletariaron en senfinan mizeron kaj pereon, el kiuj nure la Revolucio povos ĝin savi. Per tiu verko, kiu estas efektiva daŭrigo de la ĉefverko de Karl Marks, "Kapitalo", Roza Luksemburg por ĉiam konkiris lokon en la unua rango de la postmarksa marksismo. Jam en 1900, ŝi pruvis, ke eĉ la trustiĝo kaj la pli kaj pli firmaj organizo kaj interligiteco de la kapitalistaj entreprenoj ne forigas la anarĥion de la kapitalista produktado, sed ĝin reproduktas sur pli alta kaj vasta skalo. Ŝi montris sur la bazo de la valorleĝo de Marks, ke en kapitalista socio, pure sindikata agado kaj reformpolitiko neniam povas doni al la laboristaro iom post iom salajron egalan al la valoro de ĝia tuta produktaĵo, sekve neniam povas forigi la kapitalistan sistemon mem.

Lenin analizis la internan strukturon de la kapitalista socio en la periodo de imperialismo. Li elmontris, ke la indiferentiĝo de partoj de la laborista klaso rilate al la klasbatalo estis fatala, sed nedaŭra fakto. La ekspluatado de la kolonioj permesis al la kapitalistaro de la imperialistaj ŝtatoj, akiri en la kolonioj grasajn kromprofitojn, tiel ke ili ne bezonis ĝissange ekspluati la proletariojn de la kapitalistaj ŝtatoj. Dank' al tiuj kromprofitoj, ili sukcesis interesigi parton de la kapitallanda laboristaro al la imperialista politiko kaj al la koloniekspluatado. Tiamaniere per ĝusta uzado de la Marksa teorio, Lenin komprenebligas la fakton, ke je la komenco de la milito grandaj amasoj da laboristoj aprobis la militeman politikon de siaj burĝaj registaroj.[1] Bazante sin sur la detruminaco de l'kapitalismo kontraŭ la koloniaj popoloj, kiuj fariĝis unuarangaj faktoroj revoluciaj, Lenin starigis la lozungon de la komuna batalado de l' proletariaro industria kun la koloniaj popoloj subpremataj kontraŭ la burĝa tiraneco. Lenin konkludas el la monopolista karaktero de la lastepoka kapitalismo, kiu ekspluatas ĉiujn klasojn de la moderna socio, ke la proletariaro devas serĉi kunbatalantojn ankaŭ en la kamparanaro. La kunligo de ĉiuj revoluciaj fortoj en la momento de la superega krizo de l'kapitalista sistemo al li ŝajnis plej necesa. Ke tiu krizo alproksimiĝis malgraŭ la klasharmoniaj iluzioj de certaj imperialismemaj socialistoj — *ne nur teorie* ĝin elmontris Lenin kaj Roza Luksemburg, sed la eksplodo de la mondmilito en 1914 ĝin *praktike pruvis*. For estis la iluzioj pri mildiĝo de la klasaj antagonismoj, for estis la utopioj pri malapero de la klasbatalo, de perpaca alveno al socialismo! La kapitalistaj hienoj tenis la laboristan klason firme ĉe la gorĝo kaj per senindulgaj batoj ĝin instruis, ke necesas perforto por liberiĝi de perforto.

Roza Luksemburg estis mortigita sur la sojlo de la nova mondo, kiun konstruos la proletariaro. Lenin penetris en ĝin kaj gvidis la unuajn paŝojn de la venkinta laboristaro. Li restarigis la Marksan teorion pri la ŝtato, kiel subpremilo de reganta klaso, teorion, kiun la socialista movado estis forgesinta depost Marks kaj Engels. Kaj per la turno de la direktilo de la rusa politiko en 1922, per la Nova Ekonomia Politiko (NEP), li donis vivantan pravigon historian al la teorio marksista de la historia materialismo.

Jam ses jaroj pasis depost la mortigo de Roza Luksemburg, jam unu jaro depost la morto de Lenin. Ilia malapero malfermas disstarantan malplenaĵon en la vicoj de la revolucia, marksista teoriularo de la laborista movado. Ilia morto forprenis al la laborista klaso la plej geniajn cerbojn depost Karl Marks kaj Frederik Engels. *L. Revo.*

1) El tiu socia disiĝo de la laboristaro li konkludis, ke estas necese starigi firmdiscipline organizitan partion revolucian de l' proletariaro, por kontraŭbatali senindulge ĉiujn teoriajn kaj praktikajn erarojn enportatajn en la laboristan movadon de la partoj de l' proletariaro profitantaj dank' al la kromprofitoj de la kolonioj.

# Imperialismaj kulisoj de ĉiniaj okazantaĵoj

*A. Kantoroviĉ*

IV

Sur la bazo de la supre klarigita[1]), ni povas veni al la analizo de l' alilandaj faktoroj en la ĵus finiĝinta fazo de ĉina interna lukto. Post sia malvenko en la jaro 1922 Ĉjan-Czo-Lin estis pene fortiĝanta kaj armiĝanta sub japana defendo kaj kun japana akcelo. Duaflanke Ameriko, celante forpeli Japanion el ĝia ĉefa apogejo — Manĝurio, instigis pekinan registaron unuigi la landon kaj finvenki la landekstremajn ribelantojn. Konflikto estis kreskonta neeviteble, komenciĝo de militagoj estis ĝia natura finaĵo.

De la komenco mem de la milito Japanio malkaŝe subtenis Ĉjan-Czo-Lin'on. Al li estis permesite transveturigi militistarojn laŭ Sud-Manĝuria Fervojo, oni lin provizis el Japanio per mono, provizaĵoj kaj nutraĵaro. En dajrenaj dokoj estis instalataj por li militistaj ŝipoj. Eĉ pli: ekstremaj rondoj de japana militarismo postulis rektan enmiksiĝon de Japanio en la militon — "por defendo de specialaj rajtoj kaj interesoj ĝiaj en Manĝurio kaj Mongolio." Argumentoj por kaj kontraŭ tiu-ĉi interveno ĉiutage estis diskutataj en ĉiuj japanaj ĵurnaloj kaj ĝenerale observantoj konstatis, ke de la tempo de rus-japana milito de 1904 en Japanio ne estis tia ekscito ("Far Eastern Times" 12. X.). La registaro ĝis certa tempo daŭrigis deklari — kun kelkaj aludoj pri la samaj specialaj rajtoj en Manĝurio kaj Mongolio — pri sia neŭtraleco, ĉar Japanio konsideris, ke interveno povis plirapidigi la konflikton kun Ameriko kaj elvoki la saman rektan kontraŭ-intervenon de Ameriko kaj Anglio, kies rezultojn estus malfacile antaŭvidi. Sed la pozicio de Japanio kaj la lingvo de japana gazetaro estigis neniajn dubojn nek pri ĝiaj simpatioj nek pri tio, ke en la okazo de malvenko de Ĉjan-Czo-Lin ĝi haltigos atakon de ĉjiliaj militistaroj ĉe enirejo de Manĝurio.

La situacio de U-Pej-Fu, se oni atentos realan forton kaj influon de Japanio, estis tiamaniere de la komenco mem treege profita. Baldaŭ jam klariĝis, ke angla-amerika subteno de ĉjilianoj tute ne estas tiel aktiva, kiel oni povis opinii pli frue. Dum Ĉjan-Czo-Lin havis sufiĉe da mono por militi, U-Pej-Fu de la unua momento komencis suferi financan krizon. Liaj militistaroj ekestis en malbona materiala stato: ilin oni ne nutris kaj ne provizis, oni ilin ne salajris. Nome per tiuj ĉi cirkonstancoj Fin-Juj-Sjan klarigis sian perfidon al ĉjilia partio. Cetere, ĉu indas paroli, ke Japanio ankaŭ senpere partoprenis en ĉi-afero? (La tuta historio de la renverso estis antaŭdirita en japanaj ĵurnaloj antaŭ unu kaj du semajnoj ĝis kiam ĝi estis okazinta.)

V.

La venko de Ĉjan-Czo-Lin kaj de liaj alianculoj kaj prezidantigo de anjfuano Tuan-Ĉi-Ĝu signifas seriozan venkon de Japanio en tutĉinia skalo kaj same seriozan malvenkon de Ameriko. Anstataŭ forigi per la manoj de U-Pej-Fu Japanion kaj malfermi por sia kapitalo larĝajn "malfermitajn pordojn" en Norda Ĉinio, Ameriko kaj Anglio troviĝas antaŭ la perspektivo de nova epoko de eksterordinara japana influo ne nur en la landekstremaĵo, sed ankaŭ en la centro de Ĉinio. Dank' al tiu influo la militist-politika potenco de Japanio ekkreskos kaj japana kapitalo en la lukto pro Ĉinio troviĝos en speciale favoraj kondiĉoj kaj per tio ĝi fariĝos ankoraŭ pli danĝera por siaj konkurantoj.

Estas memkompreneble, ke nek Anglio nek precipe Ameriko povas paciĝi kun tiu-ĉi aferstato (koncerne Francion — ĝi mem havas apartajn lokajn interesojn en sudo de Ĉinio — en Junkano) kaj tial li ne estas tro emaj al la principo de "malfermitaj pordoj". La malvenko kondukos nur al plifortigo de ilia aktiveco en Ĉinio. Restas ekscii, kiun

1) vidi n.o 16.

nome ili elektos, kiel sian ilon — U-Pej-Fu'on, kiu ja ne foriros tute for de la scenejo aŭ iun el novaj homoj. Tiel aŭ aliel — la lukto estos daŭranta... super la faligita korpo de ĉina popolo.

El la rusa trad. S. ŜABARIN.

# Travivaĵoj en Budapest

Reveninte de Budapesto al mi estas nun eble skribi pri la vivado tiea. De tie mi ne kuraĝis, ĉar mi ne volis esti enkarcerigita en hungara kaptitejo kiel okazis al filo de iu germana direktoro, sciiginte siajn gepatrojn, kiel plaĉas al li la restado en la hungara ĉefurbo. Ĉiuj leteroj, kartoj, presaĵoj, entute ĉiaj poŝtaĵoj estas cenzurataj, kaj oni ankaŭ trovis la koncernan leteron de la direktorfilo. Tuj la polico venis al lia laborejo kaj enkarcerigis lin. Poste, oni rakontis, ke li estis vundbatita de la policanoj. Multon li devis suferi, multon lia patro devis pagi, antaŭ ol li estis liberigita kaj ĉio nur okazis, ĉar li skribis la veron; li estis akuzita pro land- kaj policofendo kaj similaj "krimoj".

Mi veturis Hungarion tra Bavario kaj Aŭstrio kaj jam je la limkontrolejo mi rimarkis ke blovas tute alia vento, t. e. oni kontrolis la pasportojn, pakaĵojn kaj eĉ la homojn pli akurate ol ĉe la limo Germanio-Aŭstrio. Dum la veturado malantaŭ la hungara limo mi kelkfoje provis sendi telegramon al mia korespondanto, kies adreson mi trovis en la SAT-jarlibro, kiun mi estis petinta, informi min pri la vivkondiĉoj kaj la aliaj necesaj sciindaĵoj. Ĉiufoje mi malsukcesis, ĉar mi ne scipovis skribi ĝin hungare, spite oni komprenis min, donante al mi germanlingvan respondon. Sola mi estis tial je la stacidomo en Budapesto, kaj post kelkaj penadoj mi trovis hotelon, kie mi povis ripozi de mia 35 hora vojaĝo. Matene je la 9a mi vekiĝis, petis la kelneron telefoni al la firmo kiu dungis min kaj ricevis la proponon uzi fiakron. La pakaĵportisto ekspedis mian pakaĵon en ĝin, mi sekvis kaj havis belan veturadon interesan tra la plej distingaj kvartaloj de Budapesto. Sed mi ne povis vidi multon; mia tuta atento estis kaptita de la veturigisto. Po ĉiuj 2—300 metrojn la rimeno de la vipo klaĉis senkompateme sur la dorson de la ĉevalo, kiu sufiĉe rapide formovis la fiakron. La turmentado konstanta malpaciencigis min tiom, ke mi meditis, ĉu mi devus diri al la veturigisto, ke li haltu kaj mi uzu alian, ĉu mi komprenigu lin, ke mi ne estas kutiminta vidi tian senĉesan turmentadon senefikan, ke tia agado ne estas inda je homo, kiu sin nomas "civilizita". Tre kontenta mi tial estis, kiam ni haltis antaŭ la fabriko, kaj mi povis forlasi la veturilon.

Post la anonco tie kaj ĉe polico mi havis sufiĉan tempon por viziti kamaradon fidindan, kies adreson mi ricevis per nia bone kaj akurate funkcianta administrejo. Sed mi lin ne renkontis. Lia frato helpeme akompanis min por serĉi loĝejon. Ni atingis post nelonge alian straton, je kies kruciĝo troviĝis ligna stratvendejeto, kiu estis plene gluita per manskribitaj anoncetoj plej diversaj. Tuj ni notis kelkajn adresojn; ni iris eble kvin minutojn, la kamarado ekstaris antaŭ dometo kies tegmento estis tiom riparenda, ke mi tute ne volis kredi, ke homoj loĝus en ĝi. Ni eniris la korton, la antaŭlasta pordo estis la de ni serĉita. Dufoje ni frapis ĝin, antaŭ ol oni malfermis; hungare diris mia akompananto nian deziron, kaj la vidvino petis enveni. Malbonodoro preskaŭ sufokis nin, pro malhelo ni vidis nenion (ni venis el hela sunbrilado). La vidvino faris grandan paroladon, kaj miaj okuloj iom post iom alkutimiĝis al la malhelo, ekkonis mallarĝan ejon, kies spaco estis plenigita per du malpuregaj litoj, malgranda forno kaj kesto, laŭŝajne anstataŭante la tablon. Kiam ni elestis, la k.do resumis la paroladon jene: la vidvino ne plu kapabla labori iel ajn pro maljuneco, trovas siajn vivbezonaĵojn per la luigado de la dua lito, en kiu ofte dormis kune dum monatoj, eĉ kvaronjaroj du personoj. Kostoj posemajne 50 miloj da kronoj hungaraj. Alia bildo: Kelo malseka, 6 malgrandaj infanoj preskaŭ nur kovritaj per ĉifonoj, la plej maljuna knabo purigas la plej junan kiu sidas en ĉifonita ĉemizeto sur la cementa planko. La patrino estis en laborejo; kie estis la patro, ni ne povis sciiĝi, la infanoj mem ne sciis, kaj la solan liton oni intencis doni al fremdulo, por ke ĉiuj infanoj almenaŭ ricevu la necesan panon. La tria estis en proksimo de fabriko; sur la antaŭa domo estis kvin- aŭ sesfoje anoncite, ke dormejo estas luebla; ni demandis laboriston, kiu staris antaŭ la pordo fumante sian longan pipon. Li diris: "Tio ne plaĉos al vi, tion mi scias. Germanoj neniam loĝas en tiaj malbonaj domoj. Dum la milito longtempe mi vivis en Germanio kiel vundito. Tamen, eniru por konvinki vin, la sepa pordo dekstre estas la loĝejo". Ni frapis ĉe la koncerna pordo kaj eniris. Varmega vaporo miksita kun malbonodorego kaj fumo ĉirkaŭis nin. Maldekstre en la kontraŭa angulo ia grizajo nedifinebla, ĉu ĝi estas putrantaj ĉifonoj, ŝlimo aŭ io alia. Rekte kontraŭ ni, laŭ la helaj radioj, la forno aŭ alia fajrujo. La posedantino de tiu ĉi "loĝejo" irigas nin en apudan ĉambreton. En la mezo forneto, maldekstre de ĝi sep litoj, dekstre kvin — preskaŭ ne imageble, ke tri personoj samtempe povas esti starante en neokupita spaco, ĉar laŭlonge la pordon je la alia flanko staris la lito de la mastrino kaj tableto sur kiu troviĝis ŝajne la manĝaĵo por kvin tie dormantaj, kiuj sidis laŭ ebleco en siaj litoj. La mastrino klarigis al ni, ke ĉiuj 12 litoj estas okupitaj; tamen ŝi povus havigi ankoraŭ dormokazon por ni ambaŭ; ja eĉ 16 ope ili dormis en la ĉambreto, krom ŝi! *Ŝi sola meze inter 16 viroj.* Mi ne volis kredi, kaj la kamarado demandis trifoje kaj ricevis ĉiufoje la jesigon pri tio! Nun imagu: La litoj staras plej dense unu ĉe la alia, ne lasante spacon inter la du longaj muroj; unu enloĝanto devas superpaŝi la alian, kiam li havis la "feliĉon" ricevi dormokazon. Unu lito kostis 17 mil kronojn. Mi mem post kelkaj minutoj, kiam mi jam estis sur la strato, ne konsciis, ĉu tio estis vero, ĉu mi vidis tion mem per miaj okuloj aŭ ĉu nur image kaŭzis tion la vaporo kaj malbonodorego! La k.do ankaŭ ĝis nun ne vidis tian loĝejon; sed ĝi ekzistis antaŭ 1/4 jaro kaj ekzistas verŝajne ankoraŭ hodiaŭ en Buda[1]) Zsigmond-ter.

En la fabrikoj la laboristoj estas same ekspluatataj kiel en Germanio, sed ili ne havas fabrik-sovetojn, kaj pli malmulte da rajtoj; decidi pli laborkomenco kaj -fino ili tute ne rajtas. Sed despli multe la laboristaro, precipe en fabrikoj kie estas okupataj prefere inaj laboristoj, estas titulata per ĉiuspecaj bestnomoj. La salajroj eĉ ne sufiĉas por la plej simplaj vivnecesaĵoj; laboristino okupata en la sama fabriko kiel mi, foje diris al mi tute senhonte, ke ŝi, kiam ŝi havas okazon, vendas sin mem por mono, se la amsoifanta voluptulo donacas al ŝi sufiĉe grandan sumon. Klarige ŝi aldonis, ke la perlabora salajro estas tro malmulta por aĉeti vestaĵon, pagi la luprezon ktp., ja, ĝi eĉ estas tro malmulta por povi aĉeti tutan dumsemajnan manĝaĵon, spite ke ĝi konsistas plej multe nur el pano, papriko, iomete da lardo kaj dumsomere multe da melonoj, kiujn oni volonte manĝas pro ilia malvarm-enhavo. La junaj laboristinoj, aĉetinte ekster la fabriko manĝaĵojn, ĉiufoje antaŭ sia foriro estis traserĉataj kaj ĉirkaŭpalpataj sur la tuta korpo, por ke ili ne povu — ŝteli ion. Antaŭ la vespera foriro ĉiuj laboristinoj devis elpreni globeton el malvasta saketo; ti-kiu nun havis la ŝancon, ekkapti helan, devis toleri, ke post la vestigo ŝi estis traserĉata kaj ĉirkaŭpalpata, sed ti-kiuj devis montri nigran, devis senvestigi sin en apuda ejo ĝis la ĉemizo, kie ili eĉ devas demeti (ne ĉiufoje) la ŝtrumpojn, ĉar povus esti, ke eble iu sub la propraj portus ŝtelitajn. Kaj tio tamen okazis. Mi persone vidis ke pro kelkaj paroj da ŝtrumpoj multaj policanoj estis penadigitaj fiksi kiom kaj kiamaniere ili estis elport-

1) Buda estas la malnova parto de Budapest, kiu nomo signifas du urbojn.

itaj. Kompreneble oni maldungis la "krimulinon kontraŭ la sankta proprajo" kaj certe ankaŭ ŝin punis. La verajn kulpulojn — ti-kiuj ne pagis al la laboristino almenaŭ tiom, ke ŝi minimume povis aĉeti la plej necesan manĝaĵon — la polico helpis plej volonte. Ja, kiu iomete konas la hungaran policon, certe ne miras pri tio. Mi havis okazon observi ĝian justecon. Peze ŝarĝita veturilo formovita de du malgrasaj ĉevaloj, montsupreniris krutan vojon. Post mallonga veturo la ĉevaloj ne plu povis tiri. Miamemore ĉeestis kvin viroj; sed anstataŭ ili helpis puŝi, ili prenis de la veturilo metrolongajn pecojn da ligno, kaj kvinope ili batis la bestojn, ke mi efektive devis deturni min, — mia koro ne plu funkciis. Mi foriris; ĉe la angulo de krucstrato aldirektiĝis policano kaj tuj intencis iri kontraŭan direkton, kiam li ekvidis ĉi tiun bildon. Mian laborkamaradon (li parolis iomete germane) mi instigis, diri al la policano, ke li konstatu la nomojn de la estajoj, malindaj nomi sin "homoj". Sed neniu kredu, ke tio okazis. Li iris pli proksime kaj — foririgis la observemulojn por ke la veturigisto kaj liaj helpantoj pli bone povu malbontrakti la bestojn. Je mia demando al mia akompananto, kion faris la policano, li respondis: "Ĉu vi ne povas kompreni tion; tion do komprenas la plej juna infano. Li senhomigas la straton, la aliaj pro tio pli rapide estos sur la monto kaj li mem, la policano, post tio ricevos "ion" pro sia helpo. Mi jam antaŭe sciis, ke ni ne povus sukcesi". Dumvoje li konsilis al mi, neniel atentigi ĉe samaj okazoj iun ajn, alie povus esti, ke mi mem estus foje la punoto. Hodiaŭ mi plene estas konvinkita, ke facile tio povas esti. Matene, irinte al la fabriko mi observis, kiel la policanoj venis kun pridubindaj inoj de la kamparvojoj al la gardejo en la ‚Pusztaseri-ut'; ofte mi vidis, kiel ili ricevis fruktojn je la foiro (Lajos-utca), diversajn trinkaĵojn en gastejoj. Antaŭmilite oni miris pri rusa koruptsistemo. Hungaraj laboristoj mem asertis, ke estas la samo en Hungario. Nur mallongan tempon mi estis en la lando de "Horty", tamen multe da leteroj mi ne ricevis, same la alia germana kunlaboranto. Ti-kiuj alvenis, plej multe estis malfermitaj de la cenzuristoj, kiuj laŭ asertoj de la hungara registaro ne ekzistas! Ĉiu el eksterlando veninta gazeto titolita iel kiel "laborista" jam instigas observi la koncernan ricevinton. Tio almenaŭ estis tre suspektinda, kaj ĉiu nigre presita kvinpinta stelo komunistinsigno! Sed nian "S.R." mi tamen ĉiam regule povis legi, kvankam estis iomete pli malfrue, spite ĝia malpermeso! Ofte vizitis la polico la esperantajn kunvenojn kaj ekzercadojn, ili ofte estis pli multaj ol la ĉeestantoj (Dohany-utca). La politikaj kunvenoj pro tio devas esti antaŭe anoncitaj. Aliloke ili ne estas tiom observemaj: Kiam estis foiro, anseroj, anasoj, kokoj kaj ties idoj kuŝis vivaj kun kunligitaj piedoj kaj flugiloj sur la varmega pavimo en plena suno dum la tuta tago, plejofte sen akvo. Buĉistoj vendis en siaj lignobutikoj viandon parte jam malbonodoretantan, plenan de malpuraĵo, kiun la vento flugigis sur la pendigitajn viandpecojn, ĉirkaŭitajn de multe da muŝoj. Al tio ili ŝajne ne povis kontraŭi.

*Vojaĝemulo.*

---

"*Marksismo ne estas pacigebla kun naciismo, se eĉ tiu estas pleje "justa", "pura", delikata, civilizita. Marksismo proponas anstataŭ ĉia naciismo — internaciismon, kunfandiĝon de ĉiuj nacioj en supera unueco, kiu kreskas antaŭ niaj okuloj kun ĉiu kilometro da fervojo, kun ĉiu internacia trusto, kun ĉiu (internacia laŭ sia ekonomia agado kaj poste ankaŭ laŭ siaj ideoj, laŭ sia celado) laborista unuiĝo.*

*La principo de nacieco estas historie neevitebla en la burĝa socio, kaj, konsiderante tiun ĉi socion, marksisto plene agnoskas historian laŭleĝecon de naciaj movadoj. Sed por ke tiu agnosko ne transformiĝu en apologion de naciismo, necesas ke ĝi estu limigata plej severe per tio, kio estas nur progresiva en ĉi movadoj, — por ke tiu agnosko ne alportu malklarigon de l' proleta konscio per burĝa ideologio.*" Lenin.

# La ekskarcerigitoj en Leipzig

En la tempojn de la Bavara soveta respubliko (en 1919), la sola, kiu stariĝis dum kelktempo en Germanio kaj donis ekzemplon pri farendo al germ. laboristaro, kondukis nin paroladoj de k.doj Sauber, Olschewsky kaj Erich Mühsam, la amnestitaj bavaraj sovetrespublikanoj, akceptitaj en Leipziga stacidomo de miloj da proletoj kaj parolantaj sub aŭspicioj de "Ruĝa Helpo" por la *politika amnestio*, kiel ili faris kaj faros en multaj urboj kaj urbetoj de Germanio. Ili ankaŭ senkaŝe esprimis sian seniluziiĝon pri la fakto, ke ne la proletaro mem en venkbatalo revolucia perfortis ilian liberiĝon el karcero, sed nur "komplezema" dekreto de nuna burĝa registaro. "Tio estas signo, ke la nuna reĝimo ankoraŭ sentas sin sufiĉe forta, por povi liberigi nin ne timante danĝeron por si dank' al la indiferento kaj malkonscieco de grandaj proletaj masoj, kiujn okazintajoj de 6 pasintaj jaroj ne revoluciigis, kontraŭe — malrevoluciigis. Tiun fakton de enkarcerigo de la plej bonaj kaj sindonemaj proletaraj batalantoj (7000) ne estus tolerinta la proletaro eĉ antaŭ milito, eĉ en tempoj de monarkio. Sed hodiaŭ — en t. n. demokrata respubliko, ĝi toleras tiun staton." — La k.doj ankaŭ rakontis pri suferoj eltenitaj multfoje en karcero (t. n. "fortikaja aresto"), pri malsatstrikoj, ĉikanoj ĉiuspecaj ktp., kaj dokumentis per sia sinteno, ke ili *ne unu peceton* fordonis de sia revolucia pensmaniero. Menciataj estu ankoraŭ la paroloj de k.do Mühsam pri la unueco de revolucia movado, kiujn li faris aludante la ĉeeston de anarkista junularo en ĉambrego: "Neniam okazu, — mi esperas, — ke foje la ruĝa kaj la nigra (anark.) standardoj staru unu kontraŭ la alia, sed ĉiam batalu kune kontraŭ la komuna malamiko!" *SAT-raporto Leipzig.*

---

# DIVERSAĴOJ

## Pri seksedukado

La feministaj grupoj de la ruĝa franca geinstruistaro petas oficiale servon de SAT por la jena grava enketo. Kamaradoj vi ĉiuj respondu detale!

1. Ĉu seksedukadon oni donas en vialandaj lernejoj?
2. *Se jes* — kiel oni konceptas ĝin — a) en la popola lernejo — b) en realaj, mezaj kaj superaj lernejoj. Priskribu la metodojn. Listigu la uzatajn librojn kun adresoj de l' eldonistoj se eble.
3. *Se ne* — kiuj izolaj provoj de seksedukado estas de vi konataj? Kie kaj kiel ili okazis? Sintenado de la registaro en la problemo de seksedukado? Debatoj en la Parlamento? Provoj por ĝiusencen plivastigi la instruprogramojn?

Bonvole respondu al: K.ino *Adrienne Montégudet — Jalesches par Clugnat (Creuse).*[1])

## Interŝanĝo de studentoj

Franca familio deziras sendi sian filon 19-jaran en anglan familion (ne Londono mem) por ke li perfektiĝu anglalingve. Interŝanĝe ĝi gastigos *unu jaron* junan anglon en la belega urbeto Saint-Germain-en-Laye apud Parizo (20 km). La junulo ĝuos apartan ĉambron, senkostan komfortan nutraĵon, familian vivon. Tolaĵoj estos lavataj kaj ĉio prizorgata. Li povos vizitadi gimnazion, reallernejon, muziklernejon, belegan mondkonatan kastelon kaj eĉ frekventi la porfremdulaĵn kursojn en la Sorbono (Parizo). Anglaj gekamaradoj peru per esperanto la interŝanĝon kaj respondu al: *M. Boubou*, 96, rue St. Marceau — *Orléans* (Francio).

---

# TRA LA KLASBATALO

Laŭ lastaj sciigoj en Ŝanhaj eksplodis novaj bataloj, kiuj eĉ tuŝe atingis la francan kvartalon.

En Jugoslavio la persekutoj kontraŭ anoj de Radiĉpartio daŭras. I. a. oni kaptis 18-jaran filon de Radiĉ. Tamen laŭ jusa informo oni intencas liberigi Radiĉ.

13. jan. en Germanio ankoraŭ ne estas kungluita nova regpova registaro kiel rezultajo de lastaj parlamentbalotoj, malgraŭ egaj klopodoj.

La malkovroj en la granda korupt-skandalo Barmat-Kutisker ("koncerno" de milit- k. revoluci-profituloj) rezultigas jam nun intimajn rilatojn de la arestitoj kun anoj de germ. regna parlamento Kune kun la proceso de la polica spiono k. amasbuĉisto Haarmann en Hannover kaj la revindika proceso de la regna prez. Ebert kontraŭ "landperfida" akuzo tio donas plej karakterizan ilustrajon pri la nuna aferstato en respublika Germanio.

1) La gekamaradoj interesataj pri tiu demando rilate al postuloj de francaj instruistinoj sindikalistaj petu franclingvan raporton de la nomita kamaradino.

# Por nia meminstruado

## Nova ciklo pri Sovetio

2]

Ne en militekniko kaj perfektaj hommortigiloj certe kaŝiĝas potenco de Soveta Federacio. Ĝi estas potenca, ĉar ĝiajn idealojn partoprenas la plimulto de homaro, krom areto da kapitalistoj kaj dume blindigitaj de ili erar-uloj, ĝi estas potenca ĉar ĝi efektive, ne hipokrite, aspiras la liberecon, ĉar ĝi neniun popolon premegas, ĉar ĝiaj devizoj ne disiĝas kun agoj; ĝi estas potenca ĉar ĝi sin apogas kaj samtempe etendas la manon de helpo al ĉiuj senhavuloj, al ĉiuj ekspluatataj kaj turmentataj, kiuj ne vane vidas en ĝi sian sinceran amikon kaj protektanton; ĝi estas potenca ĉar al ĝi apartenas la hela estonto, kie estos nek sklavo, nek premeganto, kie regos libera homo.

Soveta Federacio estas unua en mondo regno, kiu finsolvis la nacian problemon. La burĝaj kaj socialistaj registaroj ankaŭ solene deklaris liberecon de memdifino de popoloj, sed kiel ili tion efektivigas, atestas la kolonia politiko de Francio kaj de fama liberecema Anglio, kaj ankaŭ la brila pozicio de naciaj minoritatoj. En Polio, Rumanio k. a., kie ĉiu aspiro al nacia renoviĝo, al nacia libereco estas kruele persekutata kaj barbare sufokata en malliberejoj, punlaborejoj, se ne per simpla dispafado — la rimedo, evidente plej ŝatata nuntempe, kiel la plej efika kaj plej malkara. Sed ni ĵetu la plej objektivan rigardon sur estintan Rusion, tiun citadelon de despotismo, premegado kaj humiligo, kie kelkdekoj da nacioj estis mortsufokiĝantaj en ĉirkaŭpreno de bruta aŭtokratio kaj kontraŭnacilibera politiko. Ŝajnis, ke nome tie ĉi, kie la naciaj antagonismoj atingis sian apogeon, kie centjare sufokata naciismo jam transiris en formon de abomena ŝovinismo, — solvi la nacian problemon estis tasko preskaŭ senespera. Kaj kion ni vidas?

"La Soveta Ruslanda Respubliko, — deklaris la soveta registaro, — estas fondata sur principo de libera kuniĝo de liberaj nacioj, kiel Federacio de sovetaj naciaj respubikoj". — La okazintajoj submetis la Sovetan registaron al plej severa ekzameno. El natura reakcio post jaroj de jugo kaj nacia sufokado, la popoloj kvazaŭ ebriiĝis pro libero. Ne nur apartaj nacioj, sed eĉ distriktoj sin deklaris memstaraj respublikoj. Komenciĝis la disfalo en flokoj de iam potenca imperio. Sed tio nek timigis nek ŝanĝis la taktikon de Soveta registaro. Ĝi sciis, ke tiu ebriiĝo pasos kaj la Unuiĝo denove okazos sed jam libera, bazita sur firma fundamento de propra volo kaj propraj interesoj. Ĝi ne sin trompis. La nuna Soveta Federacio estas la plej centralizita kaj samtempe la plej libera en mondo. Centralizita ĉar tion diktas la vivinteresoj de ĝiaj membroj; la plej libera, ĉar tiuj membroj havas la rajton, kiun posedas neniu alia ŝtato — eliri el Federacio laŭdezire. Jen kial ili volonte mem limigis sian memstarecon.

Nun ne nur la memstaraj nacioj, federaciaj partoj, estas mem mastroj de sia vivo, sed ankaŭ la rajtoj de naciaj minoritatoj en limoj de ĉiu respubliko estas gardataj en plej vasta amplekso. Se en iu ukraina urbo ekzemple la plimulto de loĝantaro estas hebreoj aŭ poloj, la reganta lingvo en ĉiuj institucioj, juĝejo ktp. devas esti hebrea aŭ pola. Nenia reganta nacio rajtas trudi sian lingvon kaj kulturon. Male, el pli ol modestaj rimedoj estas asignata sumo por subteni la preson, kulturon de naciaj minoritatoj. Oni povas diri, ke per unu piedo Soveta Federacio jam transiris la sojlon de sennaciismo, ĉar tie kie la nacioj libere disvolviĝas — estas loko nek por ŝovinismo, nek por naciismo, tiuj specifikaj floroj de premegado kaj tiraneco. Nun ni ankoraŭ travivas la epokon de naciismo, lasinte ie malantaŭ ni la abomenan ŝovinismon, sed la tria kaj lasta etapo — epoko de sennaciismo jam ne estas malproksime! . . . La kompleta solvo de nacia problemo en Soveta Federacio estas fenomeno multe pli grava ol oni unue povas pensi. Tio ĉi ne estas nur interna rusa problemo. Dum Eŭropo dank' al sia politiko sidas sur eksplodpreta vulkano, minacanta ĉiuminute renversi ĝian tutan kvazaŭ potencan konstruajon, Soveta Federacio montras en kiu direkto estas solvenda la mondproblemo. Strangan bildon prezentas nuna socio: kiel ajn estu kolosaj la regnoj, neniu el eĉ plej potencaj povas vivi izolite kaj sin kontentigi per propraj varoj. Ĉiu bezonas produktaĵon de aliaj landoj aŭ la alilandan merkaton. Sed anstataŭ pace interŝanĝi la bezonatan, ĉiu celas konkiri la alian kaj alproprigi al si la mankaĵojn. Rezulte — milito de ĉiuj kontraŭ ĉiuj regas en la mondo.

Soveta Federacio metis la provan ŝtonon al alia sistemo. Ne almiliti unu alian, sed kunigi siajn riĉaĵojn, siajn spertojn kaj volon kaj per kolektiva forto konkiri ne homojn, sed naturon — jen ĝia vojo. Sed nur imagu nian mizeran mondon, se tiun vojon sekvos ankaŭ la aliaj popoloj, se anstataŭ militoj, armado, venenigaj gasoj kaj mortig-aeroplanoj, — la homoj kunlaborus por komuna progreso kaj feliĉo! Soveta Federacio estas kvazaŭ la ĝermo de tiu estonta socio tutmonda. Ĝi konstruis majestan fundamenton sufiĉe potencan por elteni la grandiozan konstruajon de estonteco. Ĝia tuta politika organizo estas kvazaŭ destinita por plua aliĝo: ĝi estas unuiĝo de sovetaj socialistaj respublikoj — neniu mencio pri nacia aparteno.

La fundamento staras — nur la etaĝoj estas konstruendaj. Kaj ne malproksime estas la tempo, kiam la soveta idealo pri Unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo kaj poste de tuta terglobo — fariĝos realaĵo. . . .

*Ida Lisiĉnik (3632), Kiev.*

---

## La legantaro pri "Sennaciulo"

"La titolo devas esti tia, ke la proletaria karaktero de la gazeto al ĉiu nescianto pri ni tuj estas klara, nepridubebla: "Proletaria Esperantisto" mi proponas . . . Alia difekto estas, ke la gazeto havas maltaŭgan formaton." *S. Feith-Wien.*

". . . mi esprimas mian plenan kontentecon pri "Senn". Formo kaj eksterajo min tute kontentigas. Mi ne scias kion preferi el la legindaj artikoloj; ĉar ĉiuj senescepte estas tre interesaj . . . Superflua mi opinias la kliŝojn, ĉar la spaco estas tro multekosta por aliaj pli legindaj artikoloj." *Rob. E. Bitzer-München.*

"Mi volas al vi ĉiujn miajn laŭdojn komuniki pri nia semajna jurnalo S. Tiu ĉi titolo estis tre oportune kaj ĝustguste elektita. Precipe la artikoloj kaj sciigoj pri Sovetlando min tre interesas . . . Enpresigu propagandajn desegnajojn." 1) *G. Salan-Nimes.*

"Formato estas laŭ mia deziro. Titolo bona. Nur la skribliteroj estas kontraŭ mia skribula sento kaj mi estus preferinta "antikvo" . . . Plaĉis ankaŭ al mi "Dek jarojn en P." *O. Schramm-Selb.*

"S. entute tre bone plaĉas al mi. . . Mi dezirus legi pli ofte ion pri feminismo." *Thevenet-Wallauris.*

"S. estas salutinda aperintajo. Ĉio sciinda prezentiĝas al la laborista esperantistaro. Koncize dirite: ĝia enhavo sendube estas *unika*." *Fr. Mühmel-Neunz-Neisse.*

"Mi preferas gazetformaton. Nomo "Sennaciulo" devas esti presita pli klara ol nun. Necesas laborista emblemo en titolo. Superflua mi opinias "Dek jarojn en P." *D. Snejko-Minsk.*

"Formato estas bona. Kronikon en *ĉiu* numero mi opinias superflua; sufiĉas unufoje ĉiumonate. Tre dezirinde, se la gazeto estus pli riĉe ilustrita." *V. Zirjanov-Kurgan.*

"Ni nepre devas konservi nunan formaton. Tre laŭdinda la eldonado de "La Lernanto". Estas malfacile diri ion pri la teksto; ja pro la malbonajoj estas kulpaj la artikol-verkintoj. Tamen, la enhavo estas bona, sed ne sufiĉa: Tutmonda organo (tiaformata) devas enhavi almenaŭ 20 paĝojn." *V. Kolĉinski-Kremenĉug.*

1) La kliŝoj estas sufiĉe multekostaj! — Red.

---

*La anarkisto ne estas abstraktemulo, li batalas per ĉiuj rimedoj taŭgaj laŭ la situacio kontraŭ ĉiujn formojn de aŭtoritateco de kiu ajn flanko ili staru.* El "Le Libertaire". H. Dimanche.

# TRA ESPERANTIO

## Deviga enkonduko de esperanto

*Taŝkent.* (29. decembro 1924.) Post la raporto pri esperanto de k.do *Sokolov* al studentara kunveno en orienta fakultato de Mez-Azia Regna Universitato estas akceptita decido pri deviga enkonduko de esperanto en nomitan fakultaton.

Nun tie esperanto estas enlokita en programo por ĉiuj kvar fakoj de fakultato.

Instruas k.do *Koblov.* *I. K.*

## PROTESTO

*Numero 11 de Sennaciulo sciigis nin pri la aresto de polaj blankuloj nian kamaradon* J. Zawada *en Lublino pro la ridindaj kaŭzoj. Je nia plenkunsido la 26. 12. 1924 ni unuanime akceptis decidon plej energie protesti kontraŭ la abomena senhomeca agado de pola fi-registaro, esprimante samtempe nian kamaradan kunsenton al J. Zawada, kiun ni certigas pri nia solidareco kaj preteco ne nur vorte sed ankaŭ age helpi al suferantaj kamaradoj. Ni indignante observadas la perfortojn de kapitalistaro kaj necesan momenton unuaj ekstaros en firmaj vicoj de proletaro por la lasta atako kaj postsekva venko.* *Taŝkenta SAT-anaro.*

## La "neŭtraleco" de la "neŭtralistoj"

Jen kion ni legas en "Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio" n.o 7—8 (1924) en raporto pri 2a jarkunveno de EAE en Narva:

"16. La kunveno konsentas aŭskulti raporton pri "Propagando de Esp. en Estonio" de ĉeestanta S.ro O. Sall el Narva.

La parolanto rimarkigas, ke preskaŭ neniu propagandas Esp.on inter laboristoj. Oni faru tian propagandon inter la plej radikalaj politikaj medioj.

Ĉar la parolanto de nun ekuzas partiajn signalvortojn kaj agitajn sentencojn, dum kio li tute foriĝas de la temo, la prezidanto atentigas lin pri ĉi tio unuan kaj poste duan fojon. Pro pluaj kontraŭtemaj esprimoj de la parolanto, en kiuj ripetiĝas la afikso "fi-" kaj kiuj elvokas laŭtajn malkontent-protestojn de la aŭskultantaro, la prezidanto forprenas de la oratoro la parolrajton."

Ni divenas, kial la prezidanto forprenis la parolrajton de nia kamarado. Ni do registru tiun malgrandan epizodon dum la "fi"-neŭtralista kunveno kiel novan argumenton por nia voko: For la neŭtralismon! Kaj ĉu vi miras, k.doj, legante kelkajn liniojn pli sube en la sama raporto la naive-hipokritajn frazojn:

"Laŭtradicie la kunveno je la fino stare kantis nian himnon, puran signon de tio, ke veran esperantistaron povas disigi nenia malkompreno. Fremdaj estas al ĝi rasaj malŝatoj kaj partiaj malamoj!" *H. Frank, Leningrad.*

# Apliku Esperanton!

Ofte oni estas ĉagrenataj pro ignoro de Esperanto inter rondoj aŭtoritataj revoluciaj. Se ni deziras sukcesigi nian movadon, nepre necesas forigi la kaŭzon de tiu ignora traktado, pruvi ke Esperanto estas praktika kaj uzebla lingvo, kiu meritas esti konsiderata ne malpli alte ol la ordinaraj lingvoj naturaj.

Por tion fari necesas ne propagandi kaj varbi novajn esperantistojn, sed apliki Esperanton praktike, fari el ĝi ne celon sed rimedon. Nek unu revoluciano, nek unu serioza persono povos moki kaj ignori la praktikajn rezultojn de Esperantouzado. Eĉ plie — nur la praktika elprovo de la lingvo — donos firman bazon por konservi la varbitojn sur la kampo mondlingva. Nur praktika apliko de la lingvo garantios nin de kutima okazajo, kiam 90% el ĉiuj varbitoj nin forlasas en la daŭro de sekvantaj 1—2 jaroj pro tio, ke ilia priesperanta okupo estas konsiderata de la plejmulto kiel senfundamenta kaj fantaziula.

Do, propagandu kaj agitu sed nepre ne forgesu la praktikan uzadon de la lingvo. Despli, ke uzadi ĝin praktike estas nek neeble nek malfacile. Necesas nur certa bonvolo kaj deziro por tion fari.

Kion do ni revoluciaj esperantistoj povas fari tiudirekten? Ni devos meti nian internacian lingvon je la dispono de la organizajoj, povantaj ĝin utiligi en siaj internaciaj rilatoj.

Oni multan atenton lastatempe direktas al la problemo de senpera interrilatigo de diverslandaj laboristaj organizajoj. Oni parolas pri senpera interligo de rusaj, germanaj kaj francaj laboristaj gazet-korespondantoj. Oni prizorgas la organizadon de patronado de diversaj organizaĵoj de "Ruĝa helpo" pri la politikaj malliberigitoj revolucianaj.

Ĉeloj de revolucia junularo diverslanda starigas inter si amikajn rilatojn interkoresponde. Same agas kelkloke la ĉeloj de pioniroj.

Tia internacia interrilatado fortikigas la internacian solidarecon de laboruloj. Ĝi donas bonan pruvon pri uzebleco kaj utileco de lingvo internacia. Do tiun vojon ni devas atenti kaj ekiri.

Kion ni faris ĝis nun?

Ni, revoluciaj esperantistoj, povantaj per nia lingvo senpere interrilati kun ĉiu angulo de la terglobo, ni en plej bona okazo gvidas nur *privatan* korespondon kun niaj eksterlandaj amikoj kaj kamaradoj. Ni tute ne zorgas pri pli vigla interligo per Esperanto de pli vastaj rondoj.

Tion do fari ni devas. Fakte tio estas tre facila. Faru certan pri tio proponon al ajna revoluciana ĉelo, grupo de revolucia junularo, de Ruĝa Helpo, de ruĝaj sportistoj, pioniroj. Helpu al ili starigi senperajn rilatojn kun eksterlandaj grupoj samtendencaj. Via propono estos akceptita kun danko. Nur obstinuloj neripareblaj rifuzos. Poste skribu al viaj korespondantoj, adresu al eksterlandaj kamaradoj esperantistaj certajn proponojn.

La interligilo estos organizita. Kaj de tiu interligo profitos la movado laborista, profitos la internacia movado de proletariaro, profitos nia lingvo kaj ĝia praktika apliko.

Ne tiom zorgu pri la korespondado privata, kiom pri *praktika servo per via lingvo al rondoj pli vastaj.* Nek unu kuraĝos tiam moki kaj ignori Esperanton, provitan kaj uzitan je la servo de la internaciaj laborulamasoj.

Apliku Esperanton kaj apliku ĝin publike! *E. Drezen.*

# PROMENOJ KAJ PROMENETOJ SUR MARĜENOJ DE ESPERANTAJ GAZETOJ

### (KLAĈAJ VORTOJ PRI FREMDAJ KORTOJ)

## 14. Ekzisto de komercisto

Stranga folieto, aperigata kvarfoje dum jaro de iu persono por diskonigi liajn opiniojn sub titolo "La Unuigita Tuthomaro", en sia aŭgusta n.o rakontas:

> Mi intencis esti komercisto, ĉar ĉi tiu profesio ja estas necesa; la terproduktoj kaj la fabrikajoj troviĝas en tre diversaj terlokoj; ili devas esti disdonataj . . . . La respektiva perado estas la komercista tasko, kaj mi volis servi laŭ ĉi tiu necesa tasko.

Kvankam ni ne komprenas, kial tiu ĉi vere necesa perado devas esti nepre en la formo de komercado — konkurenca, marĉanda, privatprofita, senregula, kaosa sistemo, — sed ne en la formo de organizita laŭplana koopera produktado, distribuado kaj konsumado, — ni nenion replikas. Ni vidu, kio okazas al tiu nomita bonintenca komercisto.

> La vilaĝestro aŭdinte, ke mi instalas magazenon en mia domo kaj ke mi intencas marĉandi, vizitis min kaj diris, ke mi unue devas havi ŝtatan permeson kaj devas pagi jaran imposton.

Sekvis aliaj malfeliĉoj: minacoj pri puno pro nepago de l'impostoj, prunteprenado kaj postulado de mono, doganaj malfacilaĵoj dum importo de koloniaĵoj, rilatoj kun policestro, malprofitoj ktp.

> Mi apelaciis la vilaĝanojn kaj diris: "Vi ricevis pere de mi, kion Afriko havis superflue nun, donu al mi, kion vi havas en superfluo". Sed ili ridis kaj donis nek produktojn nek monon, nur unu donacis difektitan paron da botoj.
>
> Ne povante repagi la pruntepreniтаjon mi estis akuzata. Oni prenis mian domon kaj jetis min en malliberejon, kaj mi komprenis, ke mi en hodiaŭaj cirkonstancoj ne povas esti komercisto, kiu nur volas servi laŭ amo(?).

Tiel la kapitalista sistemo kaj la kreita de ĝi ŝtata reĝimo vipas sin mem. *Moskvulo.*

**Ĉu vi jam faris ion por la Eldonkooperativo de S. A. T.? Ĉu vi fariĝis akciulo?**

# DISKUTEJO

## Laboro farenda

Por ke Esp. fariĝu iom post iom la sola lingvo, parolata de tutmonda homaro, oni devas ekkoni farendan laboron. Specialan laboron por SAT montras jena propono pridiskutenda en SAT-rondoj: Ni devas fondi esperantistajn "insulojn", ju pli multe, ju pli grandaj, ju pli disvastigataj, des pli sukcespromesanta estas la laboro. La plej naturaj "insuloj" estas la familioj uzantaj Esp. kiel ĉeflingvo. La jam uzantaj estas la plej fervoraj pioniroj por nia celo. La uzontaj devas fondiĝi. En ĉi-familioj la infanoj jam frue komencas ellerni kaj uzi la lingvon. Krom la materiala sukceso ĉi-geknaboj ankaŭ havas la formalan ekzercadon de la cerbo. "Kiu scipovas du lingvojn vivas duoble".

Sed ne sufiĉas tiom malmulte da familioj kaj oni devas provi pligrandigi niajn "insulojn" kiuj havas la destinon influi siajn ĉirkaŭajojn. La kuniĝo de kelkaj familioj al granda familio kiel kolonio estas bezonata. Eble la fakaj kamaradoj scipovas fondi kolonion de SAT en kiu sennacia spirito regos, en kiu oni praktike vivas en socialismo. Eble ke Ruslando donos okazon por la bezonata kampo. Ĉi-kolonio devus esti samtempe kastelo por ĉiuj SAT-anoj, t. e. ĝi estu libertempejo por SAT-anoj ĉiulandaj. Prelegoj kaj kursoj estu aranĝotaj tie. Ĝi estu refreŝejo por proletaj infanoj (eble kun helpo de I. L. H.). Kia instigilo por niaj ĉiulandaj geknaboj ellerni Esp.! Kia influo por multe da homoj! Certe ĉi-supraj vortoj estas nur propono. Ni bezonas priparoli ĉi-projekton necesan kaj poste — agi.

*S. Ziegler, 3388.*

## Ĉu aliĝi al I.L.H.?

Ni subtenas la opinion de k.do 1309 pri tio ke SAT ne aliĝu tiun ĉi organizajon. SAT ne fariĝu tendenceca nek tendencema. Se ĝi tion farus, funkciadi bone estus preskaŭ neeble. Se I. L. H. deziras aliĝi al SAT, tio, kompreneble, estas alia afero. Same estu pri SAT kaj iu ajn alia organizajo. Ni subtenu kaj laboru laŭ referendume decidita statuto. SAT ne fordonu sian sendependecon: se ĝi apogus sin *al* I. L. H. (aŭ alia organizajo), do ĝi montrus ke ĝiaj propraj kruroj ne plu ĝin portas: I. L. H. sin aliĝu al SAT se tio al ĝi estas neeesa, sed SAT ne *rompu sian kolon* fariĝante tendencema, precipe en direkto kiu tute al la proletaro ne gravas.

*1100.*

## Mondkarto de SAT?

K.do B. Belakov, Tuapse (Kaŭkazo, Sovet-Unio (SAT n.o 3935) esprimas la deziron, ke la eldonkooperativo eldonu detalan surtablan aŭ muran geografian karton kaj ke "Sennaciulo" havu konstantan rubrikon de la aliĝoj en SAT, por ke ĉiu SAT-ano povu fari sur la geografia karto siajn rimarkojn per flagetoj pri stato de SAT-movado en tutmonda skalo. Li petas la opinion de la SAT-anaro.

La *eldonkooperativo* tre skeptike prijuĝas la proponon, ĉar ĝi ne kredas, ke sufiĉe da SAT-anoj aĉetus la koncernan karton, por pravigi ties eldonon. Ĉiu deziranto ja povas aĉeti en sia lando mondkarton kaj laŭ plaĉo kaj kapablo skizi sur ĝi la sektorojn de SAT kaj surpingli flagetojn. Sed tio kondiĉus enpreson de ĉiuj novaj aliĝantoj en "Sennaciulo", kio kostus multe da spaco en la gazeto kaj nur estas kutimo ĉe malgrandaj unuiĝoj kaj kluboj, sed ne ĉe mondasocioj aŭ iaj grandaj organizajoj (ekz. partioj).

---

*Por la klaso de la kapitalistoj, la kolonia politiko estas neceseco, same kiel la militarismo. Sed estas malbona logiko, el tio konkludi, ke kolonia politiko estas neceseco ankaŭ por la proletariaro. Kial ne ankaŭ la militarismo? Ĝi por la proletariaro estas neceseco ne je pli alta grado ol la tuta kapitalismo. Kaj same kiel la kapitalismo fariĝis nuntempe malbono, baro al la plena disvolvo de la produkciaj fortoj de l' homaro, de vidpunkto ne nur proletaria, sed ĝenerale socia, tiel ankaŭ la kolonia politiko, kiel rimedo por plilongigo de tiu ekzisto ne per plua disvolvo de la produkciaj fortoj, sed per ilia maldisvolvo, fariĝis malbono, kiun oni devas kontraŭbatali eĉ tie, kie ĝi prezentiĝas sub formoj ŝajne bonintencaj.*

K. Kautsky (1907).

---

*„Ĉiu fakto, helpanta al organizo de laborista klaso, akcelanta ties venkon, kie ajn ĝi okazu, renkontas varman adepton en k-do Lenin. Renverse: ĉio, kio malfortigas la lukton de laborista klaso, ĉio, kio direktas tiun ĉi lukton de la internacia klasa vojo sur la vojon lokecan, malĉefan, transformante ĝin el la demokratia en la liberalan, — renkontas en k.do Lenin nepacigeblan kontraŭulon."*

M. Kalinin *(Parolado ĉe la Va Kongr. de Komintern, 18. VI. 24)*

---

# Fragmentoj el "Dek jarojn en Persio"

16) *E. Rebrik*

Sed nuntempe Kuĉik-Hano antaŭmetis siajn proponojn; al kiuj vole-nevole post longaj traktadoj konsentis aliaj gvidantoj de gilana revolucio. Kuĉik-Hano decidece kaj difinite deklaris, ke ĝis en revolucia komitato sin trovos Ehsanulla-Hano kaj ĝis soveta armeo sin trovos en Irano, li ne povas konsenti eniri en novan demokratan registaron. Tiam Ehsanulla-Hano devis traporti centron de revolucia batalo en provincon Mazanderan, kie du lokaj hanoj promesis sian helpon. En Gilano milita komando devis resti en manoj de Halu-Kurban; Kuĉik-Hano do kun siaj sindonaj "djengeli" devis kiel antaŭe gardi gilanajn arbarojn. Por veron diri, estis malmulte da ligilo kaj komuniloj inter tiuĉi „triumvirato". Ehsanulla-Hano tuj komencis sian militiron al Teheran trans netransirebla Elbrusa montaro. Halu-Kurban apenaŭ detenis kun malgrandaj fortoj fronton en Gilan kontraŭ ŝaha militistaro kaj kredeble ofte rememoradis siajn rusajn kamaradojn, kiuj lasis lin. Kuĉik-Hano do sidis en arbaroj.

Tia estis situacio, kiam rusoj forlasis Persion. 14an de julio lastaj ruĝaj taĉmentoj foriris el Enzeli al Baku. Cetere multaj rusaj volontuloj restis en servo de Ehsanulla-Hano kaj iris en Mazanderan kune kun li.

Tamen tiu-ĉi lasta entrepreno tute ne sukcesis kaj finiĝis per plena ruinigo de armeo de Ehsanulla-Hano. Vojo, kiun Ehsanulla-Hano elektis por sia militiro al Teheran, estas vere la plej mallonga, sed en sama tempo la plej malfacila kaj militmovo je tia vojo eĉ kun malmultepezaj montaj baterioj estas nekredeble peniga. En donita okazo alkondukis al fatala fino ne sole tiu ĉi kaŭzo, sed ankoraŭ la perfido el flanko de unu el supre nomitaj hanoj, kiu promesis sian helpon sed poste perfidis.

Kiam Ehsanulla-Hano forlasis Gilanon kaj komencis sian militiron al Teheran, Kuĉik-Hano komencis trakti kun Halu-Kurban pri formado de nova respublika registaro. Rezultate de traktadoj aperis 23 Asadon [1] 1300 jar. deklaracio de nova registaro, kies ĉefo estis Kuĉik-Hano en rolo de financkomisaro. Aliaj membroj de registaro estis: Halu-Kurban — militkomisaro, Heidar Amuogli — komisaro por eksterlandaj aferoj, Mirza Mehmedi — por internaj aferoj kaj Sarhoŝ — komisaro de justeco. Cetere mem Kuĉik-Hano ne aperis en Reŝt — ĉefurbo de Gilano — sed daŭrigis sidi en siaj arbaroj. Iom post iom li komencis enirigi siajn taĉmentojn de "djengeli" en Reŝt kaj Enzeli, kaj baldaŭ fariĝis klara lia deziro kapti tutan administradon en siajn manojn. Sed ĝuste en tiu ĉi punkto t. e. en demando pri transdono de financoj al Kuĉik-Hano komencis la intermalkonsentoj, ĉar Halu-Kurban decidece rifuzis transdoni al li la administracion de financoj. Tiuj ĉi malkonsentoj daŭris longe kaj fine Kuĉik-Hano komencis malamikajn farojn kontraŭ oficejestroj — adeptoj de Halu-Kurban. Unua pafo estis farita kontraŭ Muŝir-Divan — ĉefa komisaro de tutaj oficejoj (nemilitaj) en Enzeli kaj nur vundetis lin. Dua pafo ankaŭ nesukcesa vundis la guberniestron de Enzeli.

La taktiko de perforto celis terorigi Halu-Kurban'on kaj cedigi lin, sed Kuĉik-Hano evidentiĝis pli malforta ol lia rivalo kaj tiu ĉi taktiko fariĝis fatala por li mem.

En sama tempo en Reŝt okazis bataletoj inter militistoj de Halu-Kurban kaj tiuj de Kuĉik-Hano. Adeptoj de Kuĉik-Hano pli malfortaj estis venkitaj kaj reiris en arbarojn. Sed tiu ĉi foriro malfortigis fronton de Halu-Kurban kontraŭ ŝaha militistaro kaj lasis al lasta antaŭigi siajn fortojn al Reŝt.

En sekvo de tutaj tiuj ĉi okazintaĵoj Halu-Kurban vidis sin devigita tuj komenci traktadojn kun ŝaha komandantaro pri interpaco. Traktadoj daŭris preskaŭ unu semajnon kaj en rezultato Halu-Kurban rezignis je revolucia batalo, subiĝis al potenco de Ŝaho kaj konsentis efiki kontraŭ Kuĉik-Hano kune kun ŝaha armeo en ofico de generalo de kozakmilitistaro. Laŭ tiu ĉi interkonsento multaj adeptoj de Halu-Kurban el gento de kurdoj, kiel li mem transiris al servo ĉe kozakaj taĉmentoj, aliaj estis senarmigitaj kaj demobilizitaj. En mezo de oktobro 1921 ŝaha armeo okupis Reŝt'on.

Ehsanulla-Hano post sia malvenko en Mazanderan forlasis Iranon kun siaj sindonaj amikoj kaj nune gastas en soveta rusa respubliko. (Daŭrigota.)

---

1) Asado — signo de zodiako — leono. Monato de Asado = 24. julio is 23. aŭgusto.

# RECENZEJO

**Gazetoj.**

**Represis artikolojn:** *Le Libertaire,* Paris, 27. 12., Infanlaboro en Shanghai (S. 9), 31. 12. Parlamentismo (S. 7), 2. 1., Mizero de prol. en Cekoslov. (S. 11). *Tverskaja Pravda,* Tver, 18. 11. Let. el Bulgario (S. 2), 2. 11., Infanlab. en Ameriko (S. 1), 18. 11., En holandaj malliberejoj (S. 2), 26. 11., Blanka teroro en Polio (S. 2). *Pskovski Nabat,* Pskov, 4. 11., Let. el Bulgario (S. 2). *Proletarski Put,* Uljanovsk, 21. 12., En regno de malliberejoj, Finnld. (S. 10). *L' Ouvrière,* Paris, 11. 12., En Mongolio (SR. 52/53), Virinoj en Turkestan kaj Buĥaro (S. 1), [deveno ne menciita]. *De Vrije Socialist,* Zandvoort, 8 11., Alvoko de "Lueurs" (S. 5), 22. 11., Antireligia movado (S. 7), 17. 12., Kruelaĵoj de germ. tribunaloj (S. 7).

**Enpresis div. notojn:** Le Cri des Jeunes, St. Etienne, 1. 12. Informa bulteno de Intern. Transportlab. Federacio, Amsterdam, okt. La République Aixoise, Aix, 21. 12. De Arbeid, Amsterdam, 18. 10. 24.

# KORESPONDEJO

*3935.* Kompreneble estas permesite al SAT-anoj interkorespondi ne nur kun membroj, sed kun ĉiu ajn persono. Tian de vi cititan malpermeson ni ne konas. Eĉ ni ĝojas, se sukcesas niaj k.doj perletere gajni novajn anojn al SAT! *N. B.*

## Respondo al lingvaj demandoj de apuddneprano

1) *Ĉu oni povas uzi "eke" anstataŭ "subite"?*

— Ne, ĉar ek signas, laŭ la Fundamento, nur agon komencantan aŭ nedaŭran, kaj enhavas neniun ideon pri subiteco. Konsekvence eke ne povas samsignifi, kiel subite, sed nur kiel nedaŭre aŭ kiel komence.

2) *Kial oni ne rajtas skribi: Firmo (anst.* firmao), *pario (anst.* pariao)?

— Kiu diris al vi, ke vi ne rajtas skribi firmo anstataŭ firmao, tiu tute erarigis vin, ĉar firmo estas ne nur akceptebla formo, sed ankaŭ Zamenhofa, eĉ oficiala, eĉ fundamenta vorto, kiu troviĝas en la fundamenta universala vortaro.

Pri pario oni povas iomete heziti pro tio, ke Bein kaj aliaj vortaristoj akceptis la radikon pari' kun alia senco (mureto, vando, solida limigaĵo de spaco); komparu: latine parietem, france paroi. Vi tute pravas preferante la formon pario al la formo pariao, ĉar la vere ĝusta formo por la dua signifo estas certe parieto, kiu estas konforma al la latina deveno kaj kredeble estos akceptata en la estontan kvaran Oficialan Aldonon.

2) *Kiel forigi la sennombre renkontataĵn, eĉ en Esperanto vortludojn?*

— Tute nedezirinda estas absoluta forigo de ĉiuj vortludoj, ĉar ĝi neebligus la lingvon internacian, reduktante ĝin al tro malmultnombra radikaro kaj al tro malriĉa vortaro. Pro la nature tre limigita nombro de la sonaranĝoj kaj leterkombinoj neniu ajn lingvo estus ebla se oni pretendus eviti ĉiujn ajn vortludojn.

Plie, tia forigo estus tute senutila, ĉar en la praktiko la vortludoj tre malmulte ĝenas pro tio, ke preskaŭ neniu el la uzantoj rimarkas ilin. Mi neniam rimarkis la ludon, kiun vi malkovris en la vorto sentema, kaj mi vetas, ke nur tre malmultaj Esperantistoj estis tiel akrevidaj, kiel vi. Ne forgesu, ke saĝeco postulas toleron (ne fuŝkomprenu: mi ne intencas diri tol-eron) de neeviteblaj malbonoj. "Ĉio devas esti en ĝusta mezuro", laŭ la esprimo de Zamenhof, kiu prave konstante malkonsilis ĉiun ajn absolutecon.

4) *Kiel oni montru la transformiĝon de io?* Ekz.: *Domo fariĝos palaco. En ĉi-tiu frazo estas malklare, ĉu domiĝos la palaco aŭ palaciĝos la domo.*

— La solvo estas facila; diru simple: El domo fariĝos palaco, aŭ, se vi preferas, anstataŭ domo fariĝos palaco. *E. G. M.*


Tute aktuala!

SCIENCA-TEKNIKA VERKO APERIS ĈE S. A. T.

D.ro Reiche

**El la mondbildo de l' nova fiziko**

1. Modernaj konsideroj pri energio kaj radiado.
2. La elektra strukturo de l' materio.

**Trad. Herbert Muravkin**

Tute populara priskribo de gravaj modernaj problemoj. 52 paĝoj. Kutima formato.

Prezo por bonval. landoj: 0,80 sv. fr., por malbonvalutaj landoj: 0.40 mk. — SAT-anoj havas la kutiman rabaton.

Administracio de S. A. T.



DOMO de MEDICINA LABORANTO

**(Adreso: LENINGRADO, Sovet-Unio, Inĵenernaja 9)**

deziras korespondi kun medicinistoj kaj laboristoj de ĉiuj landoj pri higienaj, medicinaj, politikaj kaj aliaj temoj.

Skribu legeble! — Respondo garantiata!



Redakcio de ĉiumonata ruslingva revuo

**"Laborista Klubo"**

petas ĉiulandajn samideanojn partopreni en ĝi, sendante artikolojn kaj korespondaĵojn pri

**laboristaj kluboj,**
**laboristaj lernejoj,**
**laboristaj aŭditorioj,**
**laboristaj bibliotekoj kaj legejoj,**
**laboristaj teatroj,**
**laboristaj artrondetoj**

kaj aliaj laboristaj kulturorganizaĵoj. Korespondaĵoj estas pagotaj.

**ADRESO: Sovet-Unio, Ukrainio, ĤARKOV, placo de R. Luksemburg, N 23, "Ĉervonij Ŝlaĥ", redakcio de "Raboĉij Klub".**


**Varbu novajn abonantojn!**

**Reklamado trovas plej favoran sukceson en "SENNACIULO"**


**Jarabono:** Argentino 6 pesos; Aŭstrio 120000 kr.; Belgio 36 fr.; Brazilo 13 milr.; Britio 110 penc.; Bulgario 220 lev.; Ĉekoslovakio 60 kr. ĉ.; Danio 10 kr. d.; Estonio 650 mk.; Finnlando 70 mk.; Francio 35 fr. fr.; Germanio 8 mk. or.; Hispanio 13 peset., Hungario 8 kr. or.; Italio 36 lir.; Japanio 4.50 jen; Jugoslavio 130 din.; Litovio 16 lid.; Nederlando 6 guld.; Norvegio 14 kr. norv.; Polio 8 zlot.; Portugalio 40 esk.; Rumanio 350 lej.; Rusio 4 rubl. or.; Svedio 8 kr. sved.; Svisio 10 fr. svis.; Usono 2.50 dol. — Ankaŭ ¼jare abonebla.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG